

# NiaBulteno

OUTUBRO-DEZEMBRO 2002 OKTOBRO-DECEMBRO • Numero 80

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio  
*Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto*

Rua Dr. João Couto, 6-r/CA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217 141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

A. KASSESA



sidejo riĉiĝas per

salono  
renovigita

pĝ.13

surmapas  
pozitiva  
signo

pĝ.4



AMT



(R.R.)

*Wilhelm  
Theodor  
Oeste:*  
1918-2002

pĝ.18

Sonos lia lasta kanto

ĝeneralan asembleon la 29-an de Marto — ne maltrafu! (pĝ.3)

NOVO CURSO BÁSICO DE ESPERANTO EM LISBOA (pĝ.8)

*Nia Bulteno* (informa bulteno de  
Portugala Esperanto-Asocio)  
Numero 80 (okt.-dec. 2002)  
ISSN:0871-9241

**Redaktoroj:**  
Miquel GÓMEZ i Besòs (ĉes.)  
António MARTINS  
**Eldonkvanto:** 400 ekzempleroj  
Komputile kompostita per  
*Adobe InDesign™ 1.6*  
**Abono (4n-roj, nurekster PT):**  
10-ono de landa MA de UEA  
**Limdato** por NB81: 2003.04.05  
**Finkompostita** en: 2003.03.20

**Portugala  
Esperanto-Asocio  
Associação  
Portuguesa de Esperanto**  
(*pessoa colectiva de utilidade pública*)  
☒ Rua Dr. João Couto 6 r/c A  
PT-1500-239 LISBOA  
☎ +351 217 141 359  
☎ +351 217 933 924  
✉ info@esperanto.web.pt aŭ  
portugala@esperanto.web.pt  
☞ http://www.esperanto.web.pt

**Fondita** en 1972.04.25  
**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979  
**K-ano A:** Faria de BASTOS  
**Membroj:** 209 en 2003.03.15  
**Monata kotizo:** 1,20€  
(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:  
0,80€, malriĉuloj: 0,00€)  
**Aniĝkotizo:** 2,00€

**GVIDORGANOJ:** (ekde 2001.03.24)  
**Ĝeneral-Asemblea Stabo:**  
**Prezidanto:** José MARTINS  
**Sekretarioj:**  
Franco SIMÕES  
Werther SACRAMENTO

**Estraro:**  
**Prezidanto:** Faria de BASTOS  
**VicPrezidanto:** António MARTINS  
**Sekretario:** Alcino ALVES  
**Kasisto:** Silva ALMEIDA  
**Voĉdonantoj:** Iuri GASPARG  
Miquel GÓMEZ i Besòs  
José Luís MENDES

**Kontrol-Komitato:**  
**Prezidanto:** Vítor MARQUES  
**Revizoroj:** Manuel RUAS  
Artur OLIVEIRA

**NEELEKTITAJ POSTENOJ:**  
**Instruado:** (vakas)  
**Gazetaro:** (vakas)  
**Libro-Servo:** Silva ALMEIDA

**Kiuj vane** atendis la sekvan numeron de *Nia Bulteno*, depost la lastvintra apero de NB79, nun finfine ĝoju aŭ koleru, laŭ karaktero. Nia ekskuzo pri la malfruigo estas tio ke ĝi (la ekskuzo, kaj ankaŭ la malfruigo) estas ne plu «nia», sed nure «mia». Efektive, pro profesia kialo, Miquel apartiĝis de la redaktado (kaj de Portugalio) — kaj la eksperimento pri duopa redaktistaro (tre sukcesa, eĉ je evitado de malfruoj!) tiel devas fini. Pri *Nia Bulteno* mi provos reveni al bona ritmo kaj eksperimenti plu pri akuratigaj redaktmodeloj; dume legu aliie ĉi-numere pri plia laboro de Miquel favore al nia Asocio. Pri multo plia krome legeblas en tiu ĉi kompense dika numero: Mi atentigas la konsternan forpason de kelkaj esperantistoj en 2002, speciale tiun de Wilhelm OESTE, sed ankaŭ gajigajn novaĵojn pri definitiva (kaj finfina) kromlisbonigo de nia movado: Jam aŭgurita per la jarŝanĝa kurso raportita lastnumere, ĝi dume plene maturiĝis, kiel “pruvas” diversaj eroj de tiu ĉi numero. Ankaŭ abundas noticoj kaj anoncoj pri instruaj kaj informaj agadoj — tiuj aperas neordinare multnombro ankaŭ pro la malfruo de tiu ĉi numero, raportanta doe pri tuta jaro — sed eĉ tiel konsiderindas. Kontrastos la sekva numero, jam ĉimomente preskaŭ preta kaj kiujn vi ne vane atendos. Amike, via **red.**

**Biblioteko:** Werther SACRAMENTO  
Pedrosa ALVES  
**(periodaĵoj)** Alcino ALVES  
**(diversaĵoj)** (vakas)  
**Libro-eldonoj:** Franco SIMÕES  
Rocha da COSTA  
**Periodaĵoj:** (vd. kolofonon)  
**Ret- kaj komput-aferoj:**  
José MARTINS  
António MARTINS  
Luís MOURINHO

**Fotarkivo:** Franco SIMÕES  
**Lokaj Sekcioj:** (baldaŭ)

**Junulara Sekcio:**  
Portugala Esperanto-Junularo  
*Jovens Esperantistas de Portugal*  
☒ ☎ ☞ ĉe P.E.A.

**Honoraj Membroj:**  
António da Silva ALMEIDA  
Alsácia Fontes MACHADO†  
Manuel de FREITAS†  
Alberto Pedro da SILVA†  
Adelino Franco SIMÕES  
Manuel de Sousa TEIXEIRA†

**Landaj Rerezentantoj:**  
U.E.A.: Silva ALMEIDA  
ILEI: João SANTOS  
E.E.U.: Faria de BASTOS  
TEJO: Ricardo TOSCANO  
TEJA: Alan ROMERO  
ILERA: FRANCISCO MELO (CT1CGE)  
EJA: Faria de BASTOS  
SAT: Pedrosa ALVES  
IKUE: Salete dos SANTOS

KANDIDATARO "A":

ĜENERAL-ASEMBLEA STABO:

**Prezidanto:**  
José MARTINS  
**Sekretarioj:**  
Werther SACRAMENTO  
Miguel OLIVEIRA

**ESTRARO:**

**Prezidanto:**  
M. Faria de BASTOS  
**Vicprezidanto:**  
A. MARTINS-TUVÁLKIN  
**Sekretario:**  
Alcino ALVES  
**Kasisto:**  
A. da Silva ALMEIDA  
**Voĉdonantoj:**  
A. Guerra e PAZ  
Gonçalo NEVES  
Luís LADEIRA

**KONTROLKOMITATO:**

**Prezidanto:**  
Vítor MARQUES  
**Revizoroj:**  
Manuel RUAS  
Francisco MELO

### Korektoj al NB79

pĝ.1: "Jan-Feb" > "Jan-Mar" k.s.  
pĝ.1: mankas apudfote "STCP"  
pĝ.2: "Limdato por NB79" al  
"Limdato por NB80"  
pĝ.2: "(ekde 2000.03.22)" al  
"(ekde 2001.03.24)"  
pĝ.4: "Haveno de Komencoj" al  
"Haveno de komencoj"  
pĝ.4: "Mallerta Zeŭso" al  
ald. ", indaj Prometeoj"  
pĝ.8: "Ĝjesĝ" al "«Jes»"  
pĝ.9: "megalopaj" al "megapolaj"  
pĝ.10: "Nagykörös" al  
"Nagykörös" **red.**

## Assembleia Geral dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto Convocatória

Nos termos do art.º 22.º dos estatutos desta Associação, convoco a Assembleia Geral para reunir em sessão ordinária, no próximo dia 29 (vinte e nove) de Março, sábado, pelas quinze horas, na sede social da mesma, sita no rés-do-chão «A» do número 6 (seis) da Rua Dr. João Couto, ao Calhariz de Benfica, Lisboa, com a seguinte ordem de trabalhos:

- 1) Apreciação e votação do Relatório e Contas referentes ao ano de 2002, ouvido o Parecer do Conselho Fiscal;
- 2) Eleição dos corpos gerentes para o mandato 2003-2004;
- 3) Votação do regulamento de Secções Locais.

Convoco desde já a Assembleia Geral a reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se formar quórum.

Lisboa, 22 de Dezembro de 2001

O Presidente da Mesa,

*Prof.-Dr. José Manuel Gaspar MARTINS*

MOVADO:

## Diligentan kolegaron

Pasis la dujara mandato, kaj la gvidorganojn elektitajn en 2001 necesas reelekti. Prezentiĝas unusola kandidataro, listigita ĉiapude. Konservigas plej multaj postenoj (8 el 13), kaj ĉifoje ne okazis “seĝdanco”. Notendas la retiriĝo de la honora membro Franco SIMÕES (kio ja ne signifas forlason de lia aktiveco!) kaj lian anstataŭon per novulo Miguel OLIVEIRA. Same novas du estraranoj, Alexandra Guerra e Paz kaj Luís LADEIRA (anstataŭantaj Miquel GÓMEZ kaj Iuri GASPARG, disiĝintaj resp. pro eksterlandiro kaj pro studlaboraj devoj); apud ili, nepluanta sed certe ne nova, reestraraniĝas post 13-jara paŭzo Gonçalo NEVES. Simile revenas al postena rolo la iama kisisto Francisco MELO, nun kontrolkomitata revizoro (anst. Artur OLIVEIRA). **AM**

KRONIKO:

## Trovita Nordo

■ Werther SACRAMENTO

Min agrable mirigis la novaj esperantistoj el Oporto, kiuj ĉeestis la lastan Zamenhoffeston (vd. pĝ. 10). Ili ja ne estis multaj (3 el 18), sed ilia ceesto estis grava kiel signo de la efiko de la novaj propagandrimedoj, kiujn la nuna komunikteĥniko esperige ebligas.

Kvazaŭ naskitoj de la interreto, ili malkovris Esperanton kaj estis kore frapitaj de ĝia lingva perfekteco. Ligitaj de sia entuziasmo komuna pri la nova, de ili ĵus trovita lingvo, ili interrete interkonatigadis kaj konsistigis grupon nun ĉiusemajne kunvenantan en oportua kafejo por tie esperante babiladi (vd. pĝ. 5).

Kaj poste alvenis la momento, kiam ili kontaktis la portugalan esperanto-movadon, laŭvice pere de esperantistoj konataj en retaj babilejoj (nome Iuri kaj Johano), poste per la asocia interreta hejmpaĝo, kaj fine per ties retpoŝta diskutgrupo, iĝante plene integritaj ankaŭ en la tradicia esperanto-movado nialanda.

Komence de la pasinta jaro nia kara A. Martins, per vizito al Oporto, konkretigis la proponon pri dusemajna E-kurso, per kiu perfektigis la komencintoj kaj eĉ pliaj, ĵus varbitaj de la jamaj, ekkonis nian lingvon (vd. NB79:4-5).

Ĉio-ĉi apenaŭ okazis kaj jen fine de la sama 2002 ili venis al nia Lisbona sidejo (jam ne la unuan fojon!) kaj ravis kaj mirigis nin ĉiujn, eĉ veteranojn kun longa sperto, per lerta, gaja, konciza tamen korekta kaj klara parolkapablo en Esperanto! Brave kaj antaŭen! ■

MOVADO:

## Norda grupo studas plu

Sekve de la intensiĝo de la esperanto-agado en Oporto raportita en NB79:4-5, fondiĝis en frua 2002 **NOGESO**, Norda Grupo de Esperanto-Studado. Tiu neformala klubo kunvenas kafeje en dimanĉoj (21:30-00:00), nun en *Estrela d'Ouro*, (Rua da Fábrica), post pluraj ŝanĝoj. Agado konsistas ĉefe el tiuj instruaj vesperoj (kie la iamaj komencantoj inicas novajn), el promenoj al apudaj vidindejoj, ofte kun renkontiĝo de apudlimaj hispanaj kaj sudportugaliaj junaj esperantistoj (*Freita* montaro, Arouca, Gafanha do Carmo, Gerês – vd. NB81), kaj el mastrumado de tre interesa retpaĝaro, en <http://www.nogeso.cjb.net/>, kiu daŭre logas novajn membrojn. **AP+AM**

MOVADO:

## Jen pozitiva signo!

Post sia invito kaj ties matura meditado, la estraro ricevis januare proponon pri kreo de **PLUS**, nova loka sekcio de P.E.A. en nordorienta Portugalio, prezentita de nogesanoj (vd. pĝ. 5). Tiu propono atendas ne nur aprobon laŭ la koncerna estrara regularo, sed ankaŭ la akcepton flanke de la Ĝenerala Asembleo de tiu regularo mem (vd. pĝ. 3), kreita kaj aprobita de la estraro en 1995 sed neniam ratifita de la plenkunveno. Post tio kunvenos la membraro de la proponata teritorio kaj ties organizo estos aprobita de la nove formita sekciaro. Momente logas tie 34 PEA-anoj, kiuj estonte estos ankaŭ PLUS-anoj. **AM**

MOVADO:

## Propono pri loka sekcio

«Ni estas grupo de esperantistoj, ĉiuj loĝantaj en Portugalie kaj ĉiuj membroj de la Portugala Esperanto-Asocio, kiuj proponas la kreadon de sekcio, farita el 50 municipoj [vd. liston kaj mapon].

Per la regado de ĉi tiu sekcio, kies nomon ni proponas esti P.L.U.S. (Portugala Loka Unua Sekcio, portugale, *Secção Plus da Associação Portuguesa de Esperanto*), ni celas disvastigi la esperantan movadon kaj esti unu el la nordaj referenco-punktoj por esperantistoj en Portugalio. Ni tion faros per informado, instruado kaj simile.

Por la posteno de [estrara] reprezentanto de la sekcio ni proponas s-ron Nuno MAGALHÃES kaj por la posteno de kasisto ni proponas s-rinon Susana PEREIRA. Krom la ĝeneralajn celojn esperantajn, ni volas fari la ĉi-subon:

- Komunikati la ekzistadon de la sekcio al ĉiuj 50 municipestroj kaj estigi kunlaborajn rilatojn inter P.L.U.S. kaj urbodomoj;
- kontakti lokajn klubojn internacie;
- aliĝi al Pasporta Servo kaj tiel peri gastigadon norde;
- organizi prelegojn, kursetojn, iajn ekspoziciojn kaj ion ajn organizeblan;
- plani diversajn renkontiĝojn kaj kunlabori kongresojn.


Ni nuntempe kontakteblas per la jenaj:

- plusanoj@clic.pt
- +351 917 721 868 – Nuno MAGALHÃES
- **PLUS – ĉe Nuno MAGALHÃES**  
Rua Paulo da Gama, 550-12ªA  
4150-589 PORTO

Ni antaŭdankas vian atenton kaj volonte respondos ajnajn demandojn de vi. Samideane,

**Bruno REIS (AVR); Paulo MATOS (CBT);  
Susana PEREIRA (OVR); Miguel OLIVEIRA (VNG);  
José RODRÍGUEZ (OVR); Nuno MAGALHÃES (PRT);  
Alexandra Guerra e Paz (PRT)»**

AGD Águeda	OBR Oliveira do
ALB Albergaria-	Bairro
-a-Velha	OVR Ovar
AMT Amarante	PFR Paços de
AND Anadia	Ferreira
ARC Arouca	PRS Paredes
AVR Aveiro	PNF Penafiel
BAO Baião	PTL Ponte de
BCL Barcelos	Lima
BRG Braga	PRT Porto
CBC Cabeceiras	PVZ Póvoa de
de Basto	Varzim
CMN Caminha	VFR Santa Maria
CPV Castelo de	da Feira
Paiva	STS Santo Tirso
CBT Celorico de	SJM São João da
Basto	Madeira
ESP Espinho	SVV Sever do
EPS Esposende	Vouga
ETR Estarreja	TRF Trofa
FAF Fafe	VGS Vagos
FLG Felgueiras	VLC Vale de
GDM Gondomar	Cambra
GMR Guimarães	VLG Valongo
ILH Ilhavo	VCT Viana do
LSD Lousada	Castelo
MAI Maia	VCD Vila do Conde
MCN Marco de	VNC Vila Nova de
Canavezes	Cerveira
MTS Matosinhos	VNF Vila Nova de
MLD Mealhada	Famalicão
MRS Murtosa	VNG Vila Nova de
OAZ Oliveira de	Gaia
Azeméis	VZL Vizela



INFORMADO:

## Ladeira Koimbre pri lingva demokratio

Okazos en Koimbro, la 5-an de aprilo, plia sesio de *Fórum "Cidadania Activa, mais e melhor Democracia"*. Nova esperantisto Luís LADEIRA estas unu el la 23 invititaj prelegantoj (inter kiuj prezidento...), kaj lia 15-minuta alparolo temas *"Umalingua comum para a EU como proposta de paz e democracia"*. Esperantema materialo ĉeos la eksponatan bibliografion. **AM**

INFORMADO:

## Prestigon lerneje

En majo 2002 okazis en mezlernejo José Estêvão (mun. Avejro) eta ekspozicio pri esperanto, organizata de asociano Maria Boia MARTINS, la plej maljuna (novepoka) denaska esperantisto en Portugalio. Estis ekspozitaj la asociaj informpaneloj kaj disdonataj prospektoj, kaj la Mazi-kurso montriĝis tre populara. La kapablon flue paroli ekzotan lingvon la lernejana komunumo alte ektaksis, kaj tio, laŭ informo de la kunorganizinta patro, pozitive infuis en la propra rilato al la lingvo, flanke de la organizinto. **AM**

INFORMADO:

## RK+FS~ en JFSJB

La 13-n de majo 2002 okazis en la kultura centro de komunumo de São João de Brito (Lisbona mun.), plena per ĉ. 70-homa publiko, prelego pri esperanto gvidata de Franco SIMÕES, honora membro de nia asocio. Loke organizis komunumano kaj asociano Rocha da COSTA. **AM**

INFORMADO:

## Samlingv(ar)anoj

La tagojn 12-a kaj 13-a de aprilo lastjara esperanto rolis diskrete sed intense en kultura prilingva evento okazanta en la prestiĝa sidejo de *Casa de Goa (Baluarte do Livramento)*: Prelegaron organizis kvar asocioj (*Sociedade de Língua Portuguesa, Associação dos Antigos Estudantes de Coimbra em Lisboa*, la gastiganta kaj la nia), sed responson pri la iniciato kaj specife pri la programo havis gvidanto de du el ili, nia estrarprezidanto M. Faria de Bastos. Lia inspira blovo noteblas ĉe la temo: *«Línguas Indo-Europeias: Os fios da História e as Teias do Futuro»*, kaj en la konsisto de la prelegantaro, kie ne mankis "famaj" nomoj (Bruto da COSTA, Rodrigues dos SANTOS, Anil SAMARTH, Futre PINHEIRO, ktp.).

La temsubjekton, intence vasta kaj ebla je diversaj aliroj, enkondukis João SANTOS, kiu prelegis pri la praa hindeŭropa lingvo. Tiu estis unu el kvar planitaj prelegoj prezentotaj de esperantistoj (entute 12 prelegoj en programis) — el kiuj nur unu temis efektive pri esperanto. Tiel ĉi nia movado prezentigis kie io samtempe "normala" kaj respektinda. (Bedaŭrinde devis, pro familia problemo, elfali la prelego de Gonçalo NEVES, temunta pri la latina lingvo kaj interlingvistiko.) Prezentis mem Faria de BASTOS prelegon pri lingvaj rajtoj kaj komunika etiko, kaj MARTINS-Tuválkin gvidis prezenton de esperanto el lingvkompara vidpunkto.

Tagfine kolokvoj partoprenigis la ĉ. 60-homan publikon, aparte viglaj la duan tagon, kiam diskutiĝis mondkomunik-prospektivo kaj, i.a., esperanto. **AM**

INFORMADO:

## Pintkunveno

Laŭ iniciato de tiea instruisto Luís LADEIRA, okazis en la mezlernejo Freire Braancamp (en Pontinha, mun. Odivelas) tritaga ekspozicio pri esperanto, organizata de kelkaj lernantoj kiel projekto de la Filozofia fako. Estis disdonataj prospektoj, kaj montrataj la kutimaj informpaneloj kaj pluraj esperantaj libroj kaj periodaĵoj, kaj uzeblis komputilo kun baznivela kurso por portugallingvanoj (el <http://www.kurso.com.br/>). La posttagmezon de la meza tago okupis prelego kaj kolokvo, gvidata de António MARTINS-Tuválkin kun ĉeesto de ĉ. 30 lernantoj. (Vd. ankaŭ pĝ. 4.) **AM**

INFORMADO:

## Saŭdad' pri l' '75

Sekve de la tiea esperanta aktivado en la jaroj 1975-1978 (i.a. la organizado de la unua TEJO/KER-seminario), restis ĉe la Ekologiisma Grupo de la Koimbra Studentasocio relative granda stoko da esperanta materialo. Ties nunaj estroj ja apenaŭ sciis kio okazis antaŭ 28 jaroj, sed tiuj restaĵoj igis inviton al nia asocio prelegi kadre de ilia Kultura Semajno. Tiu okazis la 27-an de februaro; prezentigis A. Guerra e Paz, Gonçalo NEVES kaj A. MARTINS-Tuválkin antaŭ ĉeesto de ĉ. 20 studentoj. Gonçalo enkondukis per nekutima parolekzerco kun partoprenigo de la publiko, kaj oni daŭrigis per klarigoj gramatikaj, movadaj kaj komuniketikaj, glate interplektitaj kun demandrespondoj. Estis disdonitaj prospektoj pri la movado ĝenerale kaj detale pri la lingvo (po resp. 150 kaj 60). **AM**

INFORMADO:

## Kulturo Kamonie

Semado

Organizate de tiea instruisto esperantisto Wilson BRÍGIDO, okazis majo de 2002 (2-a ĝis 18-a) en la lisbona mezlernejo Camões tutsemajna ekspozicio pri esperanto. Estis montrataj 14 informpaneloj, trideko da esperantaj libroj kaj pluraj periodaĵoj, en la montrŝrankoj de tre centra pasloko kaj en la prestiĝa lerneja bibliotekejo. Estis krome disdonataj prospektoj pri la movado ĝenerale kaj detale pri la lingvo (po resp. 200 kaj 65), kaj el la centoj da vizitintaj lernantoj pluraj kontaktis la asocion por pliaj informoj.

Aduado

Kadre de la Lingvsemajno (*Semana das Línguas*) en tiu sama lisbona mezlernejo Camões (2003.03.10-14), ree la tiea instruisto Wilson BRÍGIDO iniciatis varbokazon, ĉi-foje per invito al António MARTINS-Tuválkin gvidi la merkredan prelegon kaj kolokvon, pri la temo «La postbabela serĉado de perfekta lingvo». Tion li plenumis post relego de la similnoma verko de Umberto Eco, penante stiri la temon al esperanto, mem nura ero en tiu temaro. Ĉeestis ĉ. 50 lernantoj kaj manpleno da instruistoj, kaj iom da serioza interesiĝo vekigis.

Rikolto

Sekve de ĉio-ci kaj kadre de ambicia projekto enradikigi esperanton en tiu mezlernejon, ekos tie baznivela esperanto-kurso, gvidota de la menciitaj envolvitoj (vd. pĝ. 8) **AM+WB**

ENSINO:

## NOVO CURSO!

Decorrerá a partir do próximo dia 26 de Março (pelas 18:30) um curso básico de esperanto na Escola Sec. de Camões, em Lisboa, aberto também a não-alunos. Será ministrado por MARTINS-Tuválkin com apoio de Wilson BRÍGIDO, ali docente e também esperantófono. A carga horária será de 36 horas, distribuídas por duas sessões semanais de 45 min., a decorrer até ao fim de Maio. **AM+WB**

INSTRUADO:

## Sideje malmultajn

La revenon de Gonçalo NEVES kiel instruisto al la sideja kursaro malinde salutis la fato. El la listego de principaj interesatoj (kiu restas) finfine nur al iuj kontingence konvenis la kutimaj horo kaj dato. Rezulte vizitadas la kurson nur tri lernantoj kaj unu "staĝanta" instruisto (Cosme RESINA). La lecionoj nun okazadas marde, kaj plene en esperanto — jen pri kvanto kaj kvalito... (Unu lernanto, Luís MOURINHO, jam flue parolas kaj ĉeas eĉ la kolofonon!). **AM**

INSTRUADO:

## Lernas Alcochete

Prepare al la XVIII-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj okazonta en la apudlisbona urbeto Alcochete en 2000.01.29, fondiĝis la 19-an de novembro antaŭjara la Amikeca Grupo de Alcochete, kies ĉefa agado fariĝis la komuna studado de esperanto, sub gvido de la senlaca klubano esperantisto Cosme RESINA. La daŭran kurson partoprenas nun naŭ lernantoj (31-81 jaraĝaj, avĝ.-e 61-jaraj). **AM**

INSTRUADO:

## Sokrate & Komenie

Nova esperantisto Luís LADEIRA, instruisto pri filozofio en la mezlernejo Freire Braancamp (vd. pĝ. 7), iniciatis kaj prizorgas projekton pri interlerneja komunikado per esperanto kaj interreto, kandidatigitan al eŭropunia financa apogo kadre de la programo *Socrates / Comenius*. Plene reagis al invito tri lernejoj en Hispanio, Hungario kaj Polio, kie instruas esperantistoj. La projekto antaŭvidas dujaran (2003.09-2005.07) instruadon de esperanto kun paralela aplikigo de ĝi kiel interlernantan kaj interlernejan komunikilon, uzante retbabilejon kiel ilon kaj komunan konstruadon de retpaĝoj kiel temon. Diversaj malfacilaĵoj en la preparo kaj prezento de la projekto ne senkuraĝigis la inciatinton, kaj atendatas nun respondo de eŭropuniaj decidistoj. **AM**

INSTRUADO:

## Johano samideanojn

Ekis la 8-an de novembro 2002 baznivela kurso de esperanto, sub gvido de João SANTOS (instruisto de konsiderinda ono de ĉiuj nunaj aktivaj portugaliaj esperantistoj...). La kurso daŭros ĝis la 9-a de majo, kaj ĝin regule ĉeestas 8 homoj (ĉ. 25-70 jaraĝaj, avĝ.-e 40-jaraj), post 33-opa starto. Ĝi okazas en *Casa do Caminho*, lisbona spiritisma centro, kaj proe la kursanonco avertis ke oni «celas homojn el ajna konfeso, kvankam la etoso estu spiritisma». La anoncitan kurson por instruistoj, trafe okazonta paralele, bedaŭrinde ĉeestas neniu el la kutimaj instruemuloj. **AM**

LIBRO-SERVO:

## Novaj libroj tuj aĉeteblaj

■ A. S. Almeida

- 02.050 *Esperanto-Gramatiko en Versoj, Bildoj*  
Geleta ERNÖ. 153p; 10,5×14,5 cm ..... 5,05 €
- 02.051 *Sascha ĉe Karlskoga Popola Altlernejo*  
Lars FORSMAN. 60p, 14,5×21 cm ..... 11,10 €
- 04.009 *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*  
G. WARINGHIEN + al. 1386p, 17×25 cm... 80,00 €
- 04.026 *Baza Esperanta Radikaro*  
Wouter F. PILGER. 154p, 11×18 cm ..... 6,75 €
- 08.152 *Fermita Konko, La*  
Julian MODEST. 80p, 14,5×21 cm ..... 7,00 €
- 08.153 *Krimo de Katrina*  
Sten JOHANSSON. 36p, 14,5×21 cm ..... 4,70 €
- 08.155 *Memor-Ŝtono, La*  
Nikolaus BREYER. 112p, 14,5×21 cm ..... 18,80 €
- 08.156 *Faktoj kaj Fantazioj*  
Marjorie BOULTON. 432p, 15×21 cm ..... 11,75 €

## NOVA DISKO: Simbiozo

La disko *Simbiozo* fruktis el la kunlaboro inter la muzikisto Flávio FONSECA kaj la poeto Geraldo MATTOS. Ĝi enhavas karnavalan sambon, ŝoron, bosanovon, latinan ĵazon, noveraan kaj elektronikan muzikon. ■

GAZETARO:

## Kion krome

Ne prenu *Nian Bultenon* kiel kompletajon: plenan (periodaĵan) informiĝon pri kio esperantrilata okazas en la mondo vi atingos nur ekster la "paroĥa" kadro de niaj paĝoj — abonante **internacian** esperanto-gazeton.

Malgraŭ la malapero de *Eventoj*, malfrue ĉijare, kaj tiu de *El Popola Ĉinio* jaron antaŭe, kaj malgraŭ la pli-kaj-plia "umbilikismo" de *Heroldo de Esperanto*, ekzistas multaj esperantaj periodaĵoj kiuj plene komplementas la "mankojn"

NOVA LIBRO:

## Maigret kaj la maljuna damo

Post la sukceso de *Maigret hezitas*, kiu estas jam preskaŭ plene disvendita, eldonejo Sezonoj (Kalinigrad, Rusio) ĵus eldonis ankoraŭ unu libron de Georges SIMENON — la 128-paĝan *Maigret kaj la maljuna damo*. Same kiel la unuan romanon pri komisaro Maigret, ĝin tradukis Daniel LUEZ. Ĉi-foje komisaro Maigret forlasas Parizon kaj veturas al marbordo por enketi murdon... **HG**

Mendebla en la Libro-Servo de PEA kontraŭ nur 11,99 €.

(cetere intencajn) de *Nia Bulteno*...

Per vizito al nia sidejo vi povas konatiĝi kun konsiderinda parto de la esperantlingva gazetaro, konstante eksponata po la laste ricevita numero. Samloke, en la Libro-Servo (aŭ letere), vi povas mem aboni periodaĵojn kaj ilin ricevi hejme.

Ĉikuntekste, notindas ke la organo de U.E.A., revuo *esperanto*, prezentis en sia ĉinovembra numero (1153:221) la agadon de nia asocio, surbaze de landasocia enketo, kun ilustraĵo el nia (malnova) retpaĝaro. **AM**



ALCINO



ALCINO

ARANĜOJ:

## Zamenoffesto 2002

■ Werther SACRAMENTO

Ne facilas forgesi la lastjaran feston okazintan en nia sidejo omaĝe al plua datrevano de la naskiĝo de nia Majstro. Pro du motivoj: Unue, ĉar jam de tri jaroj ni ne organizis ĉe ni tian eventon, ja tradicia en aliaj landoj. Due, kaj precipe, ĉar tiun feston plivalorigis la ĉeesto de grupo da novaj oportaj samideanoj, junaj kaj entuziasmaj, kiuj venis de sia norda urbego por kune prifesti la inter esperantistoj faman jaropan eventon (vd. pĝ. 4).

Jen kial ne facilas forgesi la lastjaran Zamenhofan Tagon en nia sidejo. Sed ne nur pro tio, samideanoj, ne nur!

Cetere aperis niaj sudaj aktivuloj ankaŭ plinombre ol ordinare — kontribuante al etoso, kiel dirite, plej bona.

Tre ĝoje kaj ĝojige venis al la sidejo la unuan fojon post pluraj jaroj du ankoraŭ junaj sed jam malnovaj samideanoj, nome Ĝina kaj Rikardo — ŝi en kristnaska vizito al Portugalio, nun kvazaŭ definitive irlandaniĝinte (bela aldono al ŝia rozario de adoptaj hejmlandoj, aparte taŭga ĉe esperantisto), kaj li pornelonge deĵoranta kiel multflanka praktikanta kuracisto en la Beja distrikta hospitalo — tiel brave pliigante la nombron de transtajiaj esperantistoj!




ALCINO



ALCINO



ALCINO



ALCINO



ALCINO

ALCINO

Ĉirkaŭtable: Werther SACRAMENTO, Nuno MAGALHÃES, MARTINS-Tuválkin, Marta T. MARTINS, Irina TUVALKINA, Faria de BASTOS, Jaime CORREIA, Alcino ALVES (fotanta), Ricardo TOSCANO, Georgina PEREIRA, Luís MOURINHO, Alexandra PAZ, Miguel OLIVEIRA, Franco SIMÕES, Olga ALMEIDA, Siloa ALMEIDA, Pedrosa ALVES, Werther SACRAMENTO.

Krome, nia prezidanto denove pruvis, ke li estas ne nur fama advokato sed ankaŭ aŭskultinda fadukantisto laŭ Koimbra stilo. Per lia baritona voĉo li ravis nin pere de pluraj kantoj, inter kiuj elstariĝis la konata "Samaritana", kiun li kantis laŭ traduko de d-ro João SANTOS.

Kompreneble, la kunveno estis ne nur... kunveno! Ĝi ja estis festo. Do oni trinkis abunde kaj manĝis ne ĝuste sed laŭguste! Escepte de la trinkaĵoj, vere la cetero, t.e., la manĝaĵoj, estis "hejme" kuiritaj, kaj aldone la kuiristo estis, laŭtradicie, nia kara samideano Alcino, ĉi-foje kun la valora helpo de nia ankaŭ

tre kara kaj kompetenta samideano Olga, kiu krome nin regaligis ĉiujn per siaj ĉiele bongustaj kaj ĝenerale estimataj kukoj! Sub honorloke pendanta portreto de Zamenhof, ni ĉion konsumis ĉe bele aranĝita tablo, kiun ĉiuj helpis ordigi, kaj kiun ornamis nia samideano Jaime, lerta ankaŭ tiufake.

Konklude: agrabla Zamenhofa tago, eksterordinare spicita de bonaj signoj pri iĝanta renaskiĝo de nia E-movado. Dankon al ĉiuj vizitintoj, dankon al niaj diligentaj kunlaborantoj je la festorganizado, kaj antaŭen, ĉar la laboro urĝas! ■

ARANĜOJ:

## Mia unua Kongreso

■ Natália do PAÇO

En la jaro 1998 mi eklernis Esperanton, kaj samsumere mi riske partoprenis kun mia edzo en la 83-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Montpellier kaj temis pri «Mediterraneo — ponto inter la Kulturoj». Kial iris mi al U.K. se mi estis komencanto? Ĉar tiel mi deziris kaj, ankaŭ, ĉar mi korespondis kun japanaj geedzoj kaj ni decidis ĉeesti en la U.K.

Kun mia edzo mi alvenis al Hotelo *Le Triangle* en Montpellier, en la antaŭnokto de la kongreso. Bedaŭrinde, dum la unua tago mi suferis sinkopon kaj feliĉe du kuracistoj tuj aperis kaj helpis min.

Poste, mi restis tiutage en la hotelo, kiu estis bona kaj komforta, kun granda ĉambro kaj bona banĉambro. Ĝi ankaŭ havis televidilon, telefonon k.t.p.

En la dua tago, mi resaniĝis kaj tiel mi povis iri al la kongresejo partopreni la solemnan inaŭguran kongresan cerimonion.

Kutime ni matenmanĝis en la hotelo, kaj la ceterajn manĝojn en teraso *Charles de Gaulle* aŭ en iu kiosko apud la hotelo.

Post du tagoj nia kongresa numero aperis afiŝita sur la "Rendevua tabulo" kaj ni vidis la mesaĝon de niaj japanaj korespondantoj. Ni interkonsentis nian renkonton kaj estis plezuro ilin vidi unufoje.

Ni renkontiĝis, kuntagmanĝis, kaj tio estis eksterordinare agrable, kvankam ni manĝis preskaŭ ĉiam la samon — kokidaĵon.

Ankaŭ ni parolis al aliaj kongresanoj — francaj, germanaj, brazilaj k.t.p. Estis tre plezure kaj interese ke ni povis interparoli kaj kompreni personojn el malsamaj landoj por la Internacia Lingvo.

Post la Kongreso, la amikeco inter ni kaj miaj japanaj korespondantoj plifirmiĝis kaj la interŝanĝo de leteroj iĝis pli kaj pli ofta, kaj interesa por ni ambaŭ.

La Kongreso finiĝis sed la rememoro restis kaj pro tio ni pensas iri al Japanio kaj ili emas viziti Portugalion.

ARANĜOJ:

## HungariJS

■ Miquel GÓMEZ i Besòs

Kiel jam tradicie, okazas en Hungario la Internacia Junulara Semajno (IJS). Ĉi-jare en urbo Székesfehérvár (1 horo trajne for de Budapeŝto), de la 25-a ĝis la 31-a de julio.

Tiu ĉi estis la 14-a IJS, do, sperto ne mankas al la Hungaroj okazante esperanto-aranĝoj kaj tio videblas dum ĝi. Kiel vi eble scias la IJS estas unu el la 4 plej grandaj junularaj esperanto-aranĝoj (post IJK, IS kaj IJF).

La sola malbona afero dum ĉi IJS estis sendubela manĝoj. Simple malbonaj. Mi esperas ke Hungaroj ne manĝas tion ĉiutage... Krom tio (kaj la fakto ke neceseja papero estis malabunda...) la aranĝo estis bonege organizita.

Mi supozas ke estis iom malpli ol 200 partoprenantoj, el multegaj landoj.

Ni havis ankaŭ koncertojn, sed ĉifoje de hungaraj grupoj, kio estas bone: ja aŭskulti ĉiam la samajn esperantajn grupojn povas esti iom laciga.

Estis, kiel ĉiam, pluraj ekskursoj, mi maltrafis

duonon ĉar ili ja ĉiam ekas tiom frue, kaj mi ĉiam tiom dormemas.

Tamen mi ne maltrafis ekskurson al iu kastelo kun neprononcebla nomo, konstruita antaŭ multaj jarcentoj por defendi sin de mongoloj, sed tio evidentiĝis ne tro vera, ĉar fakte la plej malnova ŝtono povus esti 20 jaraĝa... do, tute plene rekonstruita ruino... Krome ni vizitis metiejon, kie ni povis observi malnovajn teknikojn por farado de papero, ŝnuroj, metelaĵoj ktp, kaj fine de la tago ni vizitis vinkelon kie ni gustumis ĝustetion: vinon, kaj evidente ni uzis la eblecon por ŝpari iom da biera mono...

La internacia vespero estis ankaŭ tre bona, ne tro longa kaj kun amuzaj intervenoj de la katalunoj kaj la nederlandanoj.

Krom tio estis plenŝtopita programo, sed mi ne tro atentis pri ĝi kaj dediĉis mian tempon al amuziĝo, bierumado, kantado, babilumado... se oni volas venontjare pli detalan informon pri la oficiala programo, mi rekomendas ke iu pli serioza ol mi partoprenu la IJSn, certe estos denove interese! ■



Renovigi la sidejon: jen tre optimisma eldiro. Fakte ni renovigis nur parton de la sidejo, konkrete la salonon (kiu estas instruejo kaj biblioteko). Ĝi ricevis nun la amuzan nomon "Ĉambro Durkapulo" — kaj se vi volas scii la kialon venu al la sidejo kaj demandu surloke!

Ni ŝanĝis ĉion: ni forvendis la malnovajn meblojn, ni ŝlifis kaj refarbis la malnovajn seĝojn (12-o da), ni refarbis kaj renovigis la tablojn, ni blankigis la murojn (kio ne estis tiom facile kiom oni povas imagi, ja tiom malpuraj ili estis!), ni konstruis novan bretan sistemon por la biblioteko, ni ŝanĝis la lampojn, ni farbis la fenestrojn, ni riparitis la ŝutrojn, kaj finfine eĉ la plankon ni anstataŭigis per alia pli bela kaj helkolora — tiel ke la tuta ĉambro estas nun multe pli luma.

Mi kredas ke tiu renovigado povas esti taŭga unua paŝo kaj gvidilo por iom-post-ioma renovigado de la tuta sidejo, tiel ke ĝi iĝu alloga por fremduloj kaj novaj esperantistoj. ■

### Precizigo nepra kaj dankplena

Jen ree la menciito sin modeste mistaksas: La ĉi supra uzo de "ni" signifas fakte sole Miquel mem, plus la de li varbita neesperantista kolego. Ja tiu renovigo de la salono, krom tre inda valorigo de la sidejo, estis neforgesebla donaco de multaj, multaj horoj de tre profesia, zorgema kaj kuraĝa laboro. AM

ARANĜOJ:

# Somero Salamanka



■ Miquel GÓMEZ i Besòs

Inter la 11a kaj la 18a de julio okazis en Salamanca (Hispanio) novbakita esperanto aranĝo. Ĝi estis organizata de HEJS, kaj nomiĝis "internacia HoRo" verŝajne ĉar jam tempis ke iu kuraĝu okazigi junularan esperantan aranĝon en Iberio.

Partoprenis la 1-an Horon ĉirkaŭ 30 gejunuloj. Ne tro multaj, sed tamen estia tre internacia grupo. Ni havis tie hispanojn, katalunojn, francojn, portugalojn, rusojn, polojn, irlandanojn, italojn, nederlandanojn kaj... mi ne scias ĉu mi iujn forgesas.

La etoso estis bona, malgraŭ tio ke la ejo ne estis vere taŭga por tia aranĝo:

Ni ja ne rajtis ion ajn fari en ĝi kaj do, eĉ por simpla bierumado ni devis forlasi la ejon kaj iri enurben, sed tamen ni rapide al kutimiĝis al tio, kaj ĉiukaze la urbo Salamanca estas belega.

Oni povis ĝui koncertojn de Jomo kaj ankaŭ de Solotronik (po du: dormeje kaj trinkeje), oni povis partopreni maskobalon, ni havis multe da tempo por kantadi krokodile kaj esperante kaj kiel ĉiam je la fino estis amuza internacia vespero, kie, i.a., ni lernis, dank' al la katalunoj, la frazon «via patrino estas senhara kaj via patro ankaŭ», en la lingvo de ĉiuj partoprenantoj... sed ni jam forgesis... ■



**Internacia vespero:** Prezentas (elportugaligitan) kanton pri elefantoj la elportugalia (sed ne tro portugala) partoprenintaro: António, Marta, Irina kaj Miquel.

KANI

ARANĜOJ:

# Mediterranea debuto

■ Xana

La 31-a Kataluna kaj 4-a Transpirenea Kongreso de Esperanto okazis de la unua ĝis la tria de Novembro de 2002 en la urbo Sóller (insulo Majoroko) kaj, el nia asocio, ĝin ĉeestis krom mi mem la samideanoj José RODRÍGUEZ kaj Miguel OLIVEIRA.

Organizita de malmultaj homoj, kaj kun la temo "malgrando estas bela", la kongreso ebligis ĝuan komunikadon kaj diskutadon inter ĉirkaŭ sesdek esperantistoj (el pluraj lokoj krom Katalunio kaj Francio, kiel Kroatio, Britio, Svedio, Germanio k.t.p.). Dum tiuj tri tagoj aŭdeblis prelegoj de Paul GUBBINS ("Monato, ekzemplo de esperanta revuo" kaj "Esperanto-teatro: kiam la kurteno levi ĝos?"), Višnja BRANKOVIĆ ("Hum, la plej malgranda urbo en la mondo" kaj "Unuperpersonaj firmaoj, ekzemplo de priesperanta firmao Orbis Pictus el Trieste") kaj Hector ALÓS ("Lernado de fremdaj lingvoj: kiucele?"). Poste Karles BERGA anoncis kelkajn novaĵojn en la kataluna esperanto-movado, kiajn la novan kontaktojn kaj la "Intensajn Zagreb-Metodajn kursojn" okazontajn en Barcelono.

Estis prezentitaj la filmetoj: *Malgrandaj vilaĝetoj de Majoroko*, kaj *La balkanaj*, de Albert HERRANZ, kaj libro sekvis omaĝon al pioniroj de la esperanto-movado en Sóller, Miquel kaj Andreu ARBONA, faritan de la urbestro. Por doni al ni muzikon estis la esperantistaj

**Moke majorke:** Xana kaj José pozas sub la ŝildo de honesta ŝtofovendejo "Fimoda"...



PILKO

artistoj Gianfranco MOLLE kaj "Kaj tiel plu", kaj ankaŭ "Aires Sollerics" la folkloro grupo el Sóller.

Nu, bonŝancis la homoj kiuj ĉeestis — krom interesan kongreson oni ĝuis bonan veteron kaj agrablajn promenojn, lernante iom pri la urbo kaj pri la insulo kaj amikiĝante sub la blua ĉielo (sub la nigra ĉielo ankaŭ, speciale la noktamantoj).

Por mi, Miguel kaj José, kiuj, kiel vi eblas scias estas novaj esperantistoj, neniam antaŭe ĉeestintaj tiajn eventojn, estis tutcerte rememorinda okazaĵo. ■

**XIX-a R.P.E.** La deknaŭa Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj okazos la dekkvaran

de junio en la apudlisbona urbo Vila Franca de Xira Pliajn informojn en NB81.

**XIX-a R.P.E.**



MOVADO:

## Babil' pri TEJO (3)

■ **Miquel GÓMEZ i Besòs**

Estas kelkaj aferoj, kiuj faras de nia esperanto komunumo, ion iom apartan. Mi preskaŭ dirus specialan.

Dum multaj jaroj aperis kaj stabiligis kelkaj kutimoj, ecoj, trajtoj, ene de nia movado, ni diru ke dank' al tio, ni ekhavis veran komunumon, kun kulturaj eroj tute disaj de kiu ajn alia kulturo en la mondo.

### Sinzorgi senzorge

Unu el miaj plej ŝatataj estas la "Memzorgantejo" tiu vorto difinas ejon kie homoj zorgas pri si mem. Memzorgantejo troviĝas en kiu ajn junulara esperanto-aranĝo. Kutime estas lernejo aŭ sportumejo, kie oni en grandaj ĉambroj surplankigas aron da matracoj, sur kiuj dormos la "memzorgantoj". En la memzorgantejo troviĝas ankaŭ kutime lokoj por ke la memzorgantoj kuiru (kaj ne nepre temu pri kuirejoj) sed tio ne ĉiam tiel okazas.

Memzorganto estas do, homo kiu dum renkontiĝo zorgas pri si mem. Kial tio? Simple por malmultekostigi la aranĝon. Kutima partoprenanto (nomata plenpaganto) pagas por loĝado en ĉambro du- ĝis ok-persona (aŭ pli), kiu ricevas 3 manĝojn tage kaj troviĝas kutime tuj apud aŭ eĉ en la renkontiĝejo mem. La memzorganto, tamen ricevas amasĉambron. Devas mem zorgi pri manĝoj kaj ofte trovas ke la memzorgantejo troviĝas iom for de la renkontiĝejo mem.

Oni devas diri ke por kelkaj regulaj partoprenantoj de kongresoj, esti

memzorganto estas simple ilia kutima kaj eĉ plej ŝtata maniero partopreni la aranĝon, Oni ne nur elektas tiun eblecon pro financaj kialoj. Simple la etoso en la memzorgantejo esta tute alia ol tiu en la "normala" gastejo. Mi mem ofte memzorgantis, kaj estas tre amuza sperto.

La memzorgantejo ankaŭ povas esti nomata "amasloĝejo".

### Ĉu vi iam vidis Gufujon?

Eble vi jam konas la vorton "gufo" Ĝi estas nokta birdo kun grandaj okuloj (portugale: *Bufo-real*). Sed por esperantisto, gufujeto estas pli ol la dometo de tiu bela birdo.

Kiel vi eble scias jam de multaj, multaj jaroj oni zorgas ke estu trinkejo kaj diskejo en la renkontiĝejo mem. En tiu trinkejo oni ja povas aĉeti alkoholajn trinkaĵojn kiel biero, sed ankaŭ kolaĵojn kaj kio ajn kiel en kutima trinkejo. En tiaj trinkejoj grupiĝas ĉiam la plej noktremaj esperantistoj, kutime oni fumadas tie, oni sane ebrietas, kantas, dancas.... sed ja vi povas imagi ke ne nepre ĉiu esperantisto aprezas tiun noktan etoson, kaj tamen ŝtas noktan vivon. Por tiuj homoj oni inventis antaŭ malpli ol dek jaroj, alternativan trinkejon, kiu estis nomata dekomence Gufujo, kaj ĝi tenis tiun amuzan nomon ĝis nun. Gufujo estas do, trinkejo, mi pli bone diru teo-ejo, ĉar kutime oni nur povas trinki en ĝi teon, sed jes ja plej diversaj teo specoj estas ĉiam tie disponeblaj, ankaŭ eblas aĉeti keksojn kaj kuketojn, sed nepre oni ne vendas alkohokajaĵojn, oni nepre ne fumu en ĝi, kaj tutcerte oni ne bruu!!

Gufujo estas do, trankvila agrabla

per kandeloj lumigita kaj ĉarma ejo por babili pri la vivo, la movado, pri libroj, muziko, poemoj... pri kio ajn, trinkante teon, kaj ĝis tre tre malfrunokte...

### Ne marist' sed kapitan'

Alia grava eco de nia junulara kulturo estas "la bamba" Eĉ ekzistas verbo "bambumi" kiu signifas danci la bamba. Kio estas do bambumi?

Tio estas speciala maniero danci la bamba (kiu ja en si mem estas tradicia meksika kanto, neniu rilato al esperanto, do): La dancemuloj faras cirklon en la diskejo, plejble grandan, ene la cirklo restas aro da dancistoj; la amuziĝo de la bamba estas ke kiam oni volas forlasi la enon de la cirklo por danci kun la homoj kiuj staras dancante ĉe la cirklo mem, oni devas elekti iun, inan aŭ malinan laŭ plaĉo, por trifoje suvange kisi, kaj tial la kisata transprenas la lokon de la kisanto ene de la cirklo.

Tiu bambumado estas sufiĉe aprezata inter esperantistoj por amindumi kaj interesigi aŭ montri intereson pri iu...

Estas ankaŭ multaj aliaj interesaj aferoj kiujn vi povos malkovri dum renkontiĝoj. mi tre ŝatas ekzemple la Internacian Vesperon, kiu okazas ĉiam la lastan nokton, kaj dum ĝi ĉiu kiu tion deziras povas prezenti al la resto de la partoprenantoj, ajnan kanton, teatraĵon, poemon... do ĉio eblas, nur oni petas ne estu tro teda kaj ne daŭru tro longe.

Jen ĉio, mi esperas ke vi iom ĝuis miajn artikolojn pri TEJO kaj la junulara movado [kiuj legeblas ankaŭ en NB78:4-5 kaj en NB79:6-7].

Ĝis iam en Esperantio!! ■

## ✉ Letero Amikoj ✉

■ **A. S. Almeida (komp.)**

Brazila esperantisto deziras korespondi kun samideanoj 18-23-jaraĝaj pri arto, literaturo, futbalo, vojaĝoj, ktp.

**Rodrigo DEMEO**

✉ rodrigodemeo@hotmail.com

17-jara knabo deziras trovi amikojn kaj korespondi pri ajna temo. Ne gravas aĝo aŭ sekso. Li pretas interŝanĝi poŝtmarkojn, glumarkojn, librojn kaj revuojn.

**Lázaro Manuel LLERENA**✉ Fructuoso Rodríguez #100 c izq.  
Serafin Sánchez, Sto. Domingo  
CU-5300 VILLA CLARA  
CUBA

Grupo de mez- kaj alt-lernejaj studentoj, komencantoj, deziras korespondi tutmonde. Unuan leteron al kursestro:

**Jaroslav ZAK**✉ U. Strelnice 20  
CZ-746 01 OPAVA  
CHÉQUIA

Pola knabino deziras korespondi.

**Ania CZERNY**✉ ul. Piaskowa, 4  
PL-67-115 BYTOM ODRZ  
POLÓNIA

14-jara knabo interesiĝas pri muziko, libroj, amuzado, E-movado kaj multaj aliaj temoj.

**Zaran Bozinović**✉ Dure Salaja, 23A/1  
YU-19000 ZAJECAR  
JUGOSLÁVIA ■

NEKROLOGO:

## Wilhelm Theodor OESTE: 1913-2002

■ Franco SIMÕES

La 17-an de Oktobro 2002 forpasis en sia loĝejo en Fontanelas, Sintra, nia amiko kaj malnova germana esperantisto, naskiĝinta la 10-an de Aŭgusto 1913 en la urbo Kolonjo (Köln).

Kvankam mi mem nur ekkonis lin en nia sidejo post 1974, kiam mi revenis el Afriko, li vizitadis Portugalion jam ekde 1964 kiel tradukisto de germana industria entrepreno, laborante por ĝi en diverslandaj internaciaj foiroj — jania amiko posedis altgradan lingvlerneon kaj vastan kulturon.

En 1979 li emeritiĝis kaj translokiĝis al Portugalio, en la domo kie li, dudek tri jarojn poste, finfine forpasis.

Per liaj konoj pri la skandinava kulturo, li tradukis la islandan *Fritjohfa*

*Sagao*, kaj plurajn aliajn verkojn de la tiulingvara literaturo.

Dum la dua mondmilito li tradukis esperanten kaj tajpis la kompletan version de la kanzonoj (*Lieder*) de Schubert, estante li profunda amanto de la muziko kaj kanzonoj de tiu germana komponisto.

Antaŭ sia forpaso li estis finanta la dulingvan eldonon (germane kaj esperante) de tiu tradukverko. Nur mankis la antaŭparolo, kiun nia amiko prilaborus germane kaj esperante. Tiu eldono estis komputile prilaborita de

António ALMEIDA kaj de mi mem.

Nun ni atendas la decidon de la familio rilate la eblan liveron de la libro en la esperantistan merkaton.

Al la familio kaj precipe al lia edzino ni prezentas niajn kondolencojn. ■




## Hermínio Gambetta de CARVALHO: 1907-2002

Forpasis en februaro 2002 Hermínio Gambetta de CARVALHO, multjara aktiva movadano. Lin konatigis kun esperanto lia barejra bofrato Abílio Pereira BALTAZAR, en la jaroj 1920-aj (vd. p.ĝ.19). En lia urbeto Alhandra li gvidis iam intensan esperantistan agadon en la kultura societo Euterpe. PEA-ano ekde la

fondjaro, li kunorganizis en tiu societo, somere de 1975, memorindan informseesion, kun prezento al tre multnombra publiko de programo ĉefrolata de la tiam plej eminentaj portugalaĵaj esperantistoj. Kiel litografo, li aŭtoris esperantteman poŝtmarkprojekton iam proponitan al la portugalia Poŝto. AM


## José do Nascimento RAIMUNDO: 1918-2002

Amatora fotisto kaj radiamatoro, li eklernis esperanton en 1946, en sia urbo Portimão, kaj membriĝis en P.E.A. en la fondjaro. Li estis entuziasma esperantisto kaj ofte partoprenis R.P.E., malgraŭ fizika malhelpo. Okaze de tiu klopodo, en 1990, li pretiĝis fariĝi regiona delegito de P.E.A. Plurfoje partoprenis tradukkonkursojn de *Nia Bulteno*. Forpasis la 3-an de Junio. AM



## António Moita PEREIRA: 1914-2001

Eklernis esperanton en la 1930-aj jaroj, per kurso de Saldanha CARREIRA kaj Luzo Bemaldo. Dum pluraj jaroj, li estis la delegito de I.E.L. en Moura kaj aniĝis al P.E.A. en la jubilea jaro. Forpasis la 26-an de marto 2002, laŭ letero filina. AM



## Fernando Gomes COELHO: 1924-2002

Memlernis esperanton en la sesdekaj jaroj en Angolo, kaj PEA-aniĝis en 1979, eksciinte pri la Asocio pere de *El Popola Ĉinio*. Regule li malavare subtenis nian movadon per mondonacoj. Longe la sola esperantisto en Oliveira do Hospital, li partoprenis R.P.E. de Santo Tirso kaj gastigis alilandajn esperantistojn ĝis 1996. AM



## Abílio Pereira BALTAZAR: 1907-2002

Forpasis la 31-an de marto 2002 Abílio Pereira BALTAZAR, multjara esperantisto de Barreiro, kie li laboris kiel fervoja mekanikestro. Li estis membro de nia asocio ekde ĝia fondo, en 1972. Siatempe entuziasmigis pri esperanto sian bofraton Hermínio Gambetta de CARVALHO, ankau ĵus forpasinta (vd. p.ĝ. 18). AM



Sabia que a Associação Portuguesa de Esperanto é credora de **11 000,00 €** (\*) em quotas atrasadas...?!


## *Está nas suas mãos recuperar parte desse valor!*

Literalmente **nas suas mãos**: Verifique a etiqueta nesta mesma página e confira o estado do pagamento das suas quotas. Um **pouco** cada um faz a diferença! Pode efectuar os seus pagamentos (indicando "quotas/kotizoj", nome e/ou número de sócio) por cheque, vale postal, transferência bancária (NIB: 0035 064 000 025 961 430 49), em **breve** via *internet* por transferência segura (incl. cartão-de-crédito virtual), e, claro, **pessoalmente** na sede. **AM**

(\*) Exactamente 11 034,50 €, valor referente a 2003.03.16, distribuído por 168 sócios (de um total de 209); média dos atrasos: 51 ± 43 meses (desvio padrão).

## *Krucvortnigmeto*

**H1** Lignmanĝa larv'. **H3** Insekt' da kiu aro svarmis biblian Egiption. **H4** Enkonduko de tio kion konkludas "do". Refleksiva pronomo. **H5** Voluptmuzo. **V1** Nemara okkrurul'. **V2** Rapidpaŝ'. **V3** Timinda gigant'. **V4** Faku!'. **V5** Metalokies kemisimbolo estas nemaskla. **AM**



REMETENTE:

**Associação Portuguesa de Esperanto**  
**Portugala Esperanto-Asocio**

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA

PT-1500-239 LISBOA

PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio  
annumero

últ. quota paga  
lasta kotizpago

foto  
foto